

## Vin laŭdu mia eta kant' ... Litovi'

(originale verkita)

1. Vin laŭ-du mi - a e - ta kant', nur  
a - min-da, ĉar-ma, ver-da land', ho-

1  
vort' kaj me-lo - di', — be-la Li-to - vi'. —

2

2. Herbej', arbar', kampar' kaj mar',  
hirund' kaj cikoni',  
korus', orgen', preĝej', altar':  
benata Litovi'.

3. Vi preskaŭ dronis en sufer',  
vin liberigis Di'.  
Maria, stelo de l'esper',  
vin ŝirmu, Litovi'.

VIN LAŬDU MIA ETA KANT' • M kaj E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2004, dum la IKUE-Kongreso en Kretinga, Litovujo

Dum mia ekskurso per malnova aŭtobuso el Germanujo kelkfoje la aŭtobusaj bremsoj eligis bruon, el kiu oni povis distingi la sinsekvon de precizaj muzikaj notoj, foje e – f, foje g – c. Ili instigis min fari ĉi tiun melodion. Poste, ankoraŭ dum la kongreso, mi aldonis la tekston.